Mian individuan responsemon por kontribui vekigis la programero Festivalo de kulturoj. Krom ke mi per la stando prezentis erojn da la finna lingvo kaj kulturo, mi ankaŭ kontribuis al muzika parto. Kaj tio fariĝis per bonega nordia kunlaboro: mi, per gitaro pruntita de dano, kaj kun svedo per sia fluto, instruis al interesiĝantoj popolkanton el svedlingva finnlanda regiono.

Francoj kaj poloj kaj aliaj ŝajnis esti kontentaj pro nia finna-sveda kantoinstruado, kvankam estas kredende, ke ili poste apenaŭ memoras pri la kanto pli ol kion mi pri la lernita pola kanto. Mi memoras nur tiom, ke la poloj rifuzis traduki la lastan ĉapitron de ilia kanto, kaj lasis por imago de ni aliaj pensi, kiom maldecaj vortoj por kantoj povas ekzisti.

Konkludoj pri Rusio


Se vojaĝanton plaĉas esti bonvenigata per la verda stelo ĉe pordo de kongresejo, tion post rusiaj regionoj povas fari ankaŭ la cirklo de 12 oranĝkoloraj steloj. Eĉ se la flago sub tio estas ne nia *siniristolippu*, sed la *sinimustvalge* aliflanke de la Finna golfo. Tie mi sentis min hejma ne nur pro tio, ke mi sukcesis esti komprenata per finnisme kriplanta estona lingvo, sed ankaŭ ĉar estonoj hobbias bicikladon multoble pli ol rusoj. Mia tuja impresio estis, ke mi jam dum unua vespero en Estonio vidis pli da biciklantojn ol dum la du semajnoj en Rusio.

Mia ĉefa impresio restas, ke Rusio estas neniel terura loko. Vojoj taŭgas por biciklado, kaj mia origina revo bicikli la tutan vojon al Kovrov estis pro cirkonstancoj eĉ tute realisma, kvankam bezonus ja du semajnojn por unudirekta veturo.

Kvankam de ni finnoj estimo pri rusoj estas ne alta, ili ja estas plejparte amikaj homoj. Kaj certe pli malfermaj ol finnoj. Kelkfoje mi en kamparaj vilaĝoj renkontis homojn, kiuj havis tute sinceran intereson pri la stranga vojaĝanto. Kaj malgraŭ ke komuna lingvo inter mi kaj ili limiĝis je maksimume 50 vortoj, mi kredas ke mi sukcesis klarigi, ke mi estas finno biciklanta ĉirkaŭ la Finnan golfon.

Sed kiel ajn pri rusoj, urbojn tiom grandajn kiom St-Peterburg mi ne ŝatas. Survoje mi ja ŝatis urbojn kiel Vyborg, Ivangorod, Narva, Sillamäe, Jõhvi kaj Rakvere.

Mikko Mäkitalo



Magnus el Svedio sur vojo de rusa vilaĝo proksime de IJK-ejo.

Printempa ekskurso en la nacia parko de Leivonmäki

La ekskurso, aranĝita de Esperantoklubo de Jyväskylä, okazis la 20-an de majo en la ŝanĝema printempa vetero kun suno, vento kaj ekpluvetoj. Surprizis la aranĝantojn relative granda partoprenantaro, kiu kolektiĝis antaŭ la parka informejo. Krom el Jyväskylä venis kvin esperantistoj el Mikkeli, du el Keuruu, du el Helsinki-Kirkkonummi kaj unu el Lahti kaj Kotka.

Do entute 17 esperanto-parolantoj marŝis inter la pinegoj vikle babilante finne kaj esperante kaj studante birdojn, herbojn, muskojn kaj likenojn. Nia celo estis atingi la kabon de ĉ. 2-kilometra sabla terspino, kiu etendiĝis inter la bordoj de la lago Rutajärvi. Reveninte ni manĝis ĉe la fajro kaj mirigis per nia lingvo aliajn, kiuj samtempe ripozis kaj manĝis samloke.

La nacia parko de Leivonmäki situas ĉ. 50 km sude de Jyväskylä, proksime al la ĉefvojo

nro 4.

Ĝi havas du tute aliaspektajn partojn: unu havas multkilometran padoretaron en ŝanĝema pinarbaro kun lagoj, lagetoj kaj montetoj kaj alia konsistas el la larĝa marĉa areo, el kiu granda parto estas protektata por birdonestado kaj tial nepermesita eniri. En la informejo de tiu-ĉi parto staras 3,5-metra "torfostatuo", kiu rakontas la historion de tiu marĉo dum dekmiloj da jaroj. En la areo estas konstruita 2-kilometra "ligna pado", kiun ni marŝis kaj tie ni aŭdis unuan fojon ĉi-printempe kukolkantadon. Por ni ĉiuj ĝi promesis multajn feliĉajn jarojn.

La komuna liberaera renkontiĝo bone sukcesis kaj ni kore dankas al ĉiuj diverslokaj partoprenantoj.

*Seija Kettunen
Esperantoklubo de Jyväskylä*

Tervetuloa mukaan Jyväskylän syksyn toimintaan!

Sepänkeskuksen Happi-kokoustilassa keskiviikkoisin klo 16.30-18.30:

ke 13.10. Esperantokielinen keskustelupiiri – esperantolingva diskutrondo. Persono, kiu influis mian vivon – Henkilö, joka on vaikuttanut elämäni

ke 27.10. Jorma Ahomäki, Turku: Vilna, ensi vuoden kongressikaupunki

ke 10.11. Hallituksen kokous, jossa valmistellaan syyskokoukselle esitettäviä asioita

ke 24.11. Jyväskylän Esperantokerho ry:n syyskokous klo 16.30

ke 8.12. Vietetään kerhon pikkujoulua mm. ruojen ja jouluisen tarjoilun merkeissä

su 12.12. Järjestöjen joulumessut Hipposhallissa

Esperanton alkeiskurssi

Pentti Makkosen järjestämä näyttely "Esperantoa 100 vuotta Jyväskylässä" on kiertänyt kevään ja kesän aikana 16 eri paikassa Jyväskylässä: lukioissa, kirjastoissa, Huhtasuon kylätöimistössä ja koululaisten kevättapahtumassa Toukofestissä. Toivomme, että tämän myötä esperanto on tullut tutuksi ja kiinnostus herännyt. Siksi järjestämme esperanton alkeiskurssin viikonloppukurssina loka-marraskuun aikana. Lisätietoja Seija Kettuselta, puh. 254 609.

Opintokerhotoiminta jatkuu

Kevätkauden opintokerho *Sep fratoj en Esperanto* onnistui hyvin. Opimme paljon uutta esperanton kielestä ja Aleksis Kiven mestariteoksesta. Syksyn opintokerhon teemana on "Tra la mondo per Esperanto". Opintokerho aloittaa ke 15.9. teemalla *Persono, kiu influis mian vivon*. Myös vierailijat ja "kuunteluoppilaat" ovat tervetulleita.

Seija Kettunen

Blinduloj kongresis en blanka urbo

La 70-a internacia kongreso de blindaj esperantistoj (IKBE) okazis en aŭgusto en Beograd (Serbio kaj Montenegro). Kongreson aranĝis ĵus naskiĝinta societo La Suda Stelo kun subteno de Serbia kaj Beograda blindulasocioj kaj Beograda esperantosocieto kaj aliaj subtenantoj.

El 16 landoj partoprenis 90 kongresanoj, el Finnlando du. La ĉefa temo estis profesia edukado kaj enlaborigo de viddifektitoj. Precipe estis parolita pri enlaborigo de masaĝistoj kaj muzikistoj. Aprezo de viddifektita dungito kaj egalrajta traktado en laborsocieto estis vaste pritraktitaj. Arvo Karvinen prelegis pri la sociala fonduso de Eŭropa unio kaj enlaborigo de handikapuloj.

Dum ekskursoj ni konatiĝis kun la blindulmovado ekster Beograd en la regiono de Novi Sad. Blindulasocio en malriĉa kaj en politika senco malstabila lando provas organizi servojn de informado kaj enlaborigo al vidhandikapitoj. Muzikon oni ofte aŭdas, kampo de kulturo estas prezata. La nacia vespero konsistis el muziko, kiun nin ofertis fama preĝeja koruso, lerta pianistino, juna gefrata bando kaj ludantoj de etna arĉinstrumento. Laŭ spertuloj en la kulturo estas videblaj kaj aŭdeblaj spuroj de influo de la 300-jara

turka regado de Serbio kaj aliaj regionoj de Balkano. La tradicia kongresa programero – internacia vespero – ravis pere de talentoj kaj gajaj kontribuoj de kongresanoj mem. Ĉifoje eĉ aŭdiĝis eĥo el la jaro 1912: letero de Harald Thilander – esperanto-aktivulo en la blindulmovado – al prof. Théophile Cart.

En la urbo Beograd (blanka urbo) difektoj de bombardado en 1999 estas videblaj, sed ankaŭ renovigo. Sur la riveroj Danubo kaj Sava staras novaj pontoj, ŝipoj funkcias kiel kafejoj kaj restoracioj. Ankaŭ en la urbo troviĝas multaj restoracioj. Homoj estas helpemaj kaj turistoj povas senti sin bonvenaj.

Sekvonta IKBE okazos en Vilnius tuj post la 90-a universala kongreso. LIBE Asembleo petis, ke Arvo Karvinen daŭrigu preparlaboron de la 71-a IKBE kun litovaj gastigantoj. En 2006 IKBE okazos en Firenze kongrue kun la 91-a UK.

Ritva Sabelli

*Natalia Kasymova
(Germanio/Taĝikio)
prezentas siajn impresojn
pri la konversacia rondo,
kiun ŝi gvidis kaj dankas
kongresanojn, kiuj diligente plenumis taskojn
por la matenaj lecionoj.*



Nuori, kirjoita esperanton maailmasta!

Nuoren Voiman Liitto järjestää kirjoituskilpailun 13-19 -vuotiaille. Kirjoituskilpailun aihe on **MAAILMA RAOLLAAN**. Kirjoitus voi olla satu, kertomus, novelli tai essee, laji on proosa. Parhaista teksteistä kootaan valikoima, jonka Tammi julkaisee kirjana toukokuussa 2005.

Lähetä kirjoituksesi osoitteella:

Nuoren Voiman Liitto
Iso Roobertinkatu 29-31 A 4
00120 Helsinki

Kirjoitusten on oltava perillä 31.10.2004, katso tarkemmat ohjeet 16.9. ilmestyneestä Kodin Kuvalehdestä. Kilpailun tulokset julkistetaan Lasten ja nuorten valtakunnallisilla sanataidepäivillä Oulussa 25.2.2005. Osallistuneista valitaan kymmenen voittajaa, jotka kutsutaan kesällä 2005 kirjoittamisen kesäleirille Oriveden opistoon.

Kilpailutöitä ei palauteta, joten kannattaa ottaa itselleen kopio.

Rahasto edistää yliopistotasoisia esperanton opintoja

Suomen Kulttuurirahaston vuonna 2005 jakavien nimikkorahastojen joukossa on Terttu Östermanin rahasto. Suomen Kulttuurirahaston hakuaika päättyy perjantaina 29.10.2004.

Terttu Östermanin rahasto

Perustuu farmanomi Terttu Östermanin lahjoi-
tuksiin. Edistää säveltaiteita ja kirjallisuudentutkimusta, yliopistotasoisia esperanton opintoja ja tutkimusta sekä suomalaisen kirjallisuuden kääntämistä esperantoksi. Jakaa joka 2. vuosi. Tänä vuonna n. 48.000 euroa.

Lähde: Suomen Kulttuurirahasto Hakuopas 2005, www.skr.fi

Internacia fotokonkurso

Post ses sukcesaj konkursoj la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la sepa Internacia Fotokonkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10x15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La fotoj devas atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2004.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

La juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laureatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto" 2005.

2. 25 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto" 2005.

3. Abono de "La Ondo de Esperanto" 2005.

Specialan premion (libroj de "Sezonoj" kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2004. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2006 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Sukcesojn!

Halina Gorecka & Aleksander Korzhenkov

”La Ĉeriza ĝardeno” en Esperanto

Esperantista kontribuo al la jaro de Ĉeĥov

Ekde 2000 ”Sezonoj” ĉiujare eldonas unu ampleksan libron el la rusa klasika literaturo: ”Resurekto” de Tolstoj (2000), ”Malvivaj animoj” de Gogol (2001), ”Blankaj noktoj” de Dostojevskij (2002) kaj ”Rusa novelaro. La 19a jarcento” (2003).

Ĉi-jare aperis, okaze de la 100-a mortodato de Anton Ĉeĥov, jubilea kolekto de Anton Ĉeĥov ”Ĉeriza Ĝardeno”. Ĝi enhavas 36 rakontojn, novelojn kaj dramojn de Ĉeĥov, inter kiuj estas jam klasikiĝintaj ”Sveda alumeto”, ”Dika kaj magra”, ”Ĥameleono”, ”Ĉevala familino”, ”Ivaĉjo”, ”Enua historio”, ”La homo en ujo”, ”La damo kun hundeto”, ”Urso” kaj la titolo drama ”Ĉeriza ĝardeno”.

La tekstojn tradukis Aleksander Korĵenkov, Aleksej Birjulin, Viktor Kudrjavcev, Valentin Melnikov kaj aliaj elstaraj ruslandaj tradukantoj. Ilin kontrollegis sep okcident-eŭropaj kompetentuloj. 352 paĝoj. Mendebila en libroservo de UEA.

Halina Gorecka

Lingvopolitiko en dopado

Sportistoj jam dum jaroj disvolvis plej diversajn klarigojn, kial troveblis dopaĵoj en iliaj korpoj. Unu kutimas manĝi bananojn kun la ŝeloj, unu kutimas trinki 30 tasojn da forta teo dum tago de konkurso kaj unu estas konvinkita, ke lia dentpuriga pasto iĝis objekto de malica sabotado. Kaj laŭ la plej nova greka versio, rifuzo de dopkontrola testo estis kaŭzita de motorcikla akcidento, pri kiu ĉe-estantoj sur la sama strato nenion aŭdis aŭ vidis.

Ĉi-somere inter la bonajn klarigojn estis enkondukita lingvopolitiko. Usona kuristo asertis, ke ŝi dum konkursoj en Martinique, kolonio de Francio, uzis medicinaĵon el ujo, kies varklariga

teksto estis nur en la franca, kaj tial ne povis scii pri la malpermesita substanco en ĝi.

La monda organizo kontraŭ dopado ne akceptis la klarigon kaj ordonis por la kuristo normalan punon, dujaran malpermeson de konkurso.

(mm)

La membraro de UEA kreskas

Provizora statistiko fine de aŭgusto montras, ke post kelkajara malkreskado la membronombro de UEA turniĝis en sentebalan kreskon. La malkresko ĉesis jam pasintjare, kiam UEA havis je unu individua membro pli ol en la jaro 2002, dum la nombro de aligitaj membroj jam tiam klare kreskis kaj superis per 715 la nombron de la antaŭa jaro. Fine de aŭgusto 2004 UEA nombris 5615 individuajn membrojn, kio superas per 167 la nombron je la sama dato en 2003.

Ĝojiga detalo estas, ke unufoje de post 1997 ree plimultiĝas junaj individuaj membroj. Fine de aŭgusto la junulara sekcio TEJO ariĝis 419 individuajn membrojn, kio jam superas per 20 la definitivan nombron en 2003. Kreskas ankaŭ la populareco de la revuo ”Esperanto”, dum la nombro de membroj kun Jarlibro ankoraŭ estas sub tiu de la pasinta jaro.

(el komunikado de UEA mallongigis mm)

Misteraj personoj malantaŭ la maskoj en Valamo

Ĉu vi rekonis la personojn en la bildo sur paĝo 10 de la antaŭa numero? Ili estis de maldekstre Kauno Kilpinen (Ĵeromo), Eini Kilpinen (Ĥime-na), Toini Oittinen (Ĝizella), Osmo Kaplas (Marko), Eila Martin (Ĉen), Jukka Laaksonen (Zeharja), Päivi Saarinen (Paŭla), Varpu Karo (Ĝina) kaj Terhi Laaksonen (Fajruz).

Malkaŝis Tiina Oittinen

KULTURA ESPERANTO FESTIVALO 2005

en Helsinko 16.-23.7.2005

Kultura Esperanto Festivalo (KEF) estas jam konata koncepto en Esperantujo. La festivalon, kiu koncentriĝas ĉefe al originale esperanta kulturo, oni organizis jam sep foje en iu nordia lando. Tamen ne regule: la plej lasta KEF okazis en 2000 en Helsinko kaj post ĝi KEF tute ne okazis. Post kvin jara paŭzo FEJO kaj EKH decidis kune preni la defion kaj re-organizi KEF en Helsinko.

La datoj jam estas fiksitaj. 16.-23.7.2005 (sabato-sabato). La KEF-ejo estas ĉi-foje la lernejo Taivallahden ala-aste en la helsinka urbocentro, proksime al la strando Hietalahden ranta. Ĝi funkcios kiel amasloĝejo kaj programejo. La vesperaj, kulturaj programoj okazos grandparte

en la rokklubejo Gloria, kiu havas perfektan scenejon por koncertoj kaj teatraĵoj.

La programo konsistos refoje el bunta kaj tre altkvalita kultura oferto: muziko, literaturo, teatro, filmoj, komiksoj, danco ks. Ĉi-teme okazos ne nur prelegoj, sed kursoj, prezentoj kaj artaj plezuroj. KEF-festivalon oni ofte misinterpretas kiel junularan festivalon. KEF estas tamen ne nur por junularo, sed loz-etosa kaj juneca festivalo por ĉiu-aĝaj homoj, kiujn interesas esperanta kulturo. La pasintfoja KEF estis agrabla mikso de diversaj aĝgrupoj de infanoj ĝis pensiuloj.

Aliĝilo kaj priprogramaj informoj aperos en postaj numeroj de Esperantolehti. Sed tutcerte oni aŭdos almenaŭ nian Dolchamar sur la scenejo de Gloria. Ĉi-foje la festivalo estos ankaŭ pli malferma por ne-esperanta publiko kaj videblos vaste en la helsinka somero 2005.

Bonvenon al kulturaj ĝuoj!

ESPERANTO- FESTARIT 2005

Helsingissä 16-23.7.2005

Esperanto-festarit (Kultura Esperanto Festivalo eli KEF) on perinteikäs festivaali, jota on järjestetty säännöllisen epäsäännöllisesti jossain pohjoismaassa. Festivaalin pääteemana on alkupe-
rällisesti esperantonkielinen kulttuuri. Nyt Helsingissä FEJOn ja Helsingin esperantoseuran yhteisvoimin järjestämä Esperanto-festari on järjestyksessä jo kahdeksas. Tapahtumapaikkoina ovat Taivallahden ala-aste Hietaniemen rannan tuntumassa sekä iltaohjelmiin loistavasti soveltuva Gloria Helsingin keskustassa.

Viikon (16.-23.7.2005) ajan on tarjolla korkeatasoista ja monenlaista kulttuuriohjelmaa: musiikkia, kirjallisuutta, teatteria, filmejä, sarakuvia ja tanssia niin luentoina, kurssena kuin esityksinäkin. Kyseessä ei suinkaan ole vain nuorisofestivaali, vaan kyseessä on kansainvälinen, rentohenkinen tapahtuma, joka on tarkoitettu kaikenikäisille esperantokulttuurista kiinnostuneille, vauvasta vaariin. Myös aloittelijoille Esperanto-festarit on hyvä tilaisuus tulla kurkistamaan esperantomailmaa, kartuttamaan kielitaitoaan ja tutustumaan ulkomaalaisiin alan harrastajiin.

Ilmoittautumislomake ja tarkemmat ohjelmatiedot ilmestyvät seuraavissa Esperantolehdissä.

Tervetuloa kulttuurinautintoihin!

Riitta Hämäläinen

Karavano al la 90-a UK en Vilno somere 2005

BB3 – Buse al Baltio

Esperanto-Asocio de Finnlando planas aranĝi komunan busvojaĝon al la venontsomera Universala Kongreso en Vilno. La kongresa semajno komenciĝos kiel ĉiam sabate, venontjare do la 23-an de julio.

La nuna plano estas, ke la grupo ekveturos ŝipe vendrede (22.7.) matene el Helsinki al Tallinn, prenos la karavanan buson el Tallinn tagmeze kaj travojaĝos vendrede tra Estonio kaj parton de Latvio rigardante dum paŭzoj vidindaĵojn. Tranoktado estos ie en Latvio. Sabatmatene la karavano daŭrigas ĝian veturadon kaj alvenos al la Litova ĉefurbo sabate posttagmeze.

En Vilno eblos mem aranĝi tranoktadon laŭ la oferto de la kongreso. Ankaŭ ni klopodos trovi taŭgan hotelon por la karavananoj en la urbocentro.

Reveturo okazos tuj post la fermo, dimanĉon, la 30-an de julio kaj same dumvoje la karavananoj tranknos ie en Latvio aŭ en Estonio. Al Tallinn ni alvenos vespere la 31-an de julio por kapti la vesperan ŝipon al Helsinki.

La aranĝantoj de la karavano studas nun eblecojn uzi aŭ finnlandan aŭ estonan vojaĝagentojn, kiu aranĝos la veturadon el Tallinn al Vilno kun tranoktadojn dumvoje kaj eble ankaŭ kun hotela tranoktado dum la kongreso. Prezo de la karavano laŭ ĝisnunaj provizoraj ofertoj de la vojaĝagentoj estus inter 300 kaj 600 eŭroj, depende de tio, ĉu estos inkluzivita hotelo en Vilno.

Por la sekva gazeto ni havos pli ekzaktajn informojn doni al vi. Ni tamen petas, ke vi informos al Tiina antaŭ la 30-an de novembro, ĉu interesiĝas al vi partopreni la karavanon. Se minimume 20 personoj provizore aliĝos, ni daŭrigos planadon. Vi povas ankaŭ publiki viajn opiniojn kaj ideojn en la EAF-agadas retlisto.

Bonvenon partopreni la karavanon! Ĝi certe ofertas al ĉiuj belan someran travivaĵon!

*Por la aranĝanta grupo
Tiina Oittinen, sekretario de EAF
(kontaktinformoj sur paĝo 2)*

Karavaani Vilnaan! Bussilla Baltiaan (BB3)!

Haluatko lähteä yhteisellä linja-autolla via Baltiaa pitkin ensi kesän kongressikaupunkiin Vilnaan? Ilmoittaudu mukaan Suomen Esperantoliiton järjestämään karavaaniin!

Karavaanin lähtö järjestetään niin, että perillä ollaan juuri sopivasti kongressin aloituspäivänä 23.7.2005. Lähtö laivalla Helsingistä Tallinnaan on siis perjantaiamuna 22.7. ja bussilla jatketaan heti samantien Tallinnan satamasta. Matkalla katselemme Viron ja Latvian nähtävyyksiä ja yövymme sopivalla paikkakunnalla Latvian puolella.

Kongressikaupunki Vilnasta voi itsekukin varata majoituksen joko kongressin kautta tai oma-toimisesti, mutta myös karavaaniryöryhmämme selvittää mahdollisuuksia löytää sopiva hotelli

kaupungin keskustan tuntumasta.

Paluu tapahtuu sunnuntaina 30.7. heti kongressin päätöspanojen jälkeen ja jälleen ajamme läpi Liettuan ja Latvian. Yöpyminen Latviassa tai Virossa. Seuraavana aamuna lähdemme kohti Tallinnaa. Tarkoitus on ehtiä 31.7. iltalaivalla Helsinkiin. Matkan hinta on 300-600 euroa riippuen siitä, kuuluko siihen majoitus Vilnassa vai ei. Olemme pyytäneet tarjouksia sekä suomalaisilta että virolaisilta matkatoimistoilta ja seuraavassa lehdessä kerromme tarkempia tietoja matkasta. Toivomme kuitenkin, että kaikki kiinnostuneet ilmoittautuisivat alustavasti Tiinalle 30.11.2004 mennessä. Jos vähintään 20 henkilöä ilmoittautuu siihen mennessä, jatkamme matkan suunnittelua.

- ▷ Voitte myös kertoa meille ideoita ja ehdotuksia matkajärjestelyiksi esimerkiksi EAF-agadas listan kautta.

Tervetuloa karavaanimatkalle! Kesäinen via Baltia on varmasti hieno elämys, puhumattakaan mukavasta esperantoa puhuvasta matkaseurasta!

*Karavaaniryhmän puolesta
Tiina Oittinen, EAF:n sihteeri
(yhteystiedot lehden sivulla 2)*

Taskodivido de nova estraro de UEA

Post sia elekto en Pekino la membroj de la nova Estraro de UEA decidis pri sia taskodivido, kiu baziĝas sur la agadkampoj, pri kiuj la estraranoj esprimis interesigon kaj pretecon, kiam ili estis kandidatoj.

Prezidanto *Renato Corsetti* respondecas pri ĝenerala planado, eksteraj rilatoj kaj informado. Vicprezidanto *Claude Nourmont* transprenis la agadkampojn kulturo kaj kongresoj, dum la fakon de ĝenerala sekretario *Ulla Luin* difinas ŝia titolo. Same kiel en la antaŭa Estraro, *Ans Bakker-ten Hagen* respondecas en sia dua mandatperiodo pri financoj kaj administrado. Kiel plian respondecon ŝi transprenis la rilatojn kun TEJO. *Maritza Gutiérrez González* estas estrarano pri landa agado, dum *Yu Tao* aparte respondecas pri la agado en Azio kaj krome pri kreado de nova strukturo de Amikoj de Esperanto. Al konata tereno revenas *Amri Wandel*, kiu havas en sia dosierujo fakan kaj sciencan agadon, pri kiuj li okupiĝis ankaŭ en la Estraro de *Lee Chong-Yeong* en 1995-1998.

Neniu el la elektitaj estraranoj kandidatiĝis por informado, pro kio prezidanto *Corsetti* transprenis la estraran respondecon pri ĝi. Por malplipezigi lian ampleksan taskaron la Estraro elektis komitatano *Jukka Pietiläinen* kiel specialan komisiiton pri informado por funkcii kiel la dekstra mano de la prezidanto sur tiu grava kampo.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Estraro kunvenis

La estrara kunveno 6/2004 okazis en la EAF-oficejo 28.08.04 je 11.20-15.40. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Tuomo Grundström, Taneli Huuskonen, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen, Auli Vihermä, Timo Pirinen, Eero Rinta-Karjanmaa kaj parte la kasisto Anna-Liisa Heikkinen.

La jarkotizoj de Esperantolehti 2005 restas la samaj. Sekve: ĝenerala abonprezo 15,00 e, membroj 10,00 e. Membrosocietoj abonantaj al ĉiuj siaj membroj pagas 9,25 e, FEJO por siaj ordinaraj membroj nur 7,60 e. La estraro rekomendas al la membrosocietoj aboni laŭ eblecoj la gazeton al ĉiuj siaj membroj.

La estraro fintraktis preparajn aferojn por Aŭtunaj Tagoj de Iisalmi.

Pri Al kvalita komunikado (AKK) la estraro traktis kelkajn erojn. Pri grafika identeco ni difinis la celojn kaj interkonsentis pri kunlaboro kun Francisco Veuthey en Roterdamo. Kreo de grafika identeco por EAF troviĝas en la aktuala projektplano de Al kvalita komunikado sub la agadkampo Informa strukturo. "Ni planas dum la dua fazo trovi, helpe de grafikisto, la grafikan formon por ekuzi la projektan mesaĝon Al kvalita komunikado kiel allogan sloganon de EAF interealie sur kovertoj kaj leterpaperoj." En la buĝeto troviĝas 1 500 eŭroj por Grafika identeco (planado, presado kaj alia utiligo). Flanke de EAF aktive sekvas la dezajnan laboron Anna Ritamäki kaj Päivi Saarinen. Ni celas ke la dezajna laboro progresu tiel ke la estraro povu pri-trakti proponon en sia novembra kunsido.

La biblioteka konsilgrupo decidis havi unuan kunsidon 4.9.2004 en la oficejo [tio ankaŭ okazis. La bibliotekistoj Sirkka Mattlin, Tuuli Åkerman kaj Paula Harju kunvenis kun Anna-Liisa Heikkinen, Ritva Sabelli kaj Päivi Saarinen]. La kunvenkostojn pagas AKK.

La estraro konfirmis la aranĝadon de la trejnseminario en Oriveden opisto, dum la semajnfino 30.-31.10.2004 laŭ la oferto 48 eŭroj/paketo

kun tranokto kaj manĝoj en dulitaj ĉambroj. La kostojn kovros AKK laŭ la samaj principoj kiel por la unua AKK-seminario.

La estraro decidis, ke la sekvaj Vintraj Tagoj okazos en Tampere-regiono en marto 2005 kaj forte aprezas helpon de Antaŭen en la aranĝado.

La Aŭtunajn Tagojn 2005 estos aranĝitaj kiel vojaĝo al la Esperantodomo en Lesjöfors. Veturado el Stockholmo al Lesjöfors verŝajne okazos per sveda aŭtobuso helpe de lokaj esperantistoj.

La estraro informiĝis pri someraj planoj, Kultura Esperanto-Festivalo kaj diskutis pri diversaj eblecoj organizi karavanon al la Universala Kongreso en Vilno.

La nova librotenisto Paula Niinikorpi esprimis zorgojn pri sia kapablo fari librotenadon kaj por EAF kaj por FEJO dum 2005, kiam estos aranĝita KEF kun multa plia laboro al ŝi. La estraro petas, ke ŝi tamen prizorgos la Asocian librotenadon dum 2005 [kaj ŝi poste konsentis pri tio].

Carola Antskog petis subvencion por reprezentanti EAF:n en la komitatokunsido de EEU en Bilbao 22.-28.8.2004 [raporto ĉi-numere]. La estraro decidas pagi la kongreskotizon (70 e) kaj loĝadon (152 e), entute 222 eŭrojn laŭ ŝia peto. La ceterajn kostojn ŝi pagos mem.

Kontaktoj kun UEA: En la Jarlibro 2004 aperis la anonco de EAF: Venu al Finnlando 2005. En Universala Kongreso de Pekino salutis por EAF Taneli Huuskonen. Tuula Virolainen reprezentis EAF:n kiel A-komitatano en la komitatokunsido dum la Pekina UK, kiel B-komitatano Jukka Pietiläinen.

En Baltaj Esperanto-Tagoj (BET) en julio partoprenis dudeko da finnlandanoj. Markku Saastamoinen salutis por EAF. Estis ankaŭ prelego pri finna literaturo. La sekva BET estos en Latvio 16.-23.7.2005.

La estraro informiĝis pri diversaj FEJO-aktivaĵoj. FEJO havis budon en etnofestivalo Faces en Billnäs, Karis 31.7.-1.8.2004. Por la budo

estis farita nova T-ĉemizoj kaj multobligita prospekto. Dolchamar koncertis en la festivalo kaj Patrik Austin prezentis Esperanton en infana parto de la festivalo.

Patrik Austin estis intervjuita de hejma gazeto Kotiliesi. La artikolo kun la titolo Kapinallinen kielimies (ribela lingvisto) aperis en numero 16 17.8.2004.

La estraro informiĝis pri esperantokursoj en diversaj partoj de Finnlando, interalie en laboristaj kaj civitanaj institutoj.

La estraro decidis laŭbezone kunsidi en Aŭtunaj Tagoj kaj en novembro. [La kunsido estos alvokita por la 13a de novembro, en la oficejo.]

Kompilis la prezidanto

Eventokalendaro de EAF

2004

[29.10.04 Kunveno de la projekta grupo Al kvalita komunikado, Orivesi]

30-31.10.04 Trejnseminario por aktivuloj, Orivesi (EAF AKK-projekto)

[13.10.04 EAF-estraro, Helsinko]

2005

marto Vintraj Tagoj en Tampereregiono

4-8.7.05 Kursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

16-23.7.05 Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko (FEJO)

23-30.7.2005 Universala Kongreso en Vilno, Litovio (UEA), karavano planata de Finnlando

aŭgustokomenco Internacia Junulara Kongreso, Pollando (TEJO)

septembro Aŭtunaj Tagoj kiel ekskurso al Esperantodomo en Lesjöfors, Svedio

AKK-oferto por aktivuloj kaj aktivemuloj:

Trejnseminario kun Ziko fine de oktobro

Nia sekva trejnseminario de Al kvalita komunikado okazos la lastan semajnfino de oktobro 30-31 oktobro 2004 en la Orivesi-instituto (Oriveden opisto). Nia eksterlanda ĉefpreleganto estas Ziko Marcus Sikosek, verkinto de Esperanto sen mitoj kaj laboranto ĉe la arkivo kaj biblioteko de UEA en Roterdamo. Li havas kritikan aliron al la tradiciaj manieroj informi pri esperanto. Li povas prezenti faktojn malantaŭ la mitoj kaj diskutigi nin. Kian ideologion ni reale reprezentas en la esperantomovado? Kian bildon ni donis antaŭe pri ni mem – kaj kian ni volas doni nun?

La trejnseminario celas kontribui al la celoj de Al kvalita komunikado: fortigi niajn informajn rutinojn, trejni nin por pli koni niajn aferojn por ke ni pli bone povu komuniki ilin. Niaj aktivuloj estas nia ĉefa bonhavo kaj tial ni organizas la seminarion. Per aktiva partopreno ĉiu kontribuas al la celoj.

Invititaj estas la EAF-funkciuloj, la FEJO-estaro kaj du reprezentantoj de ĉiuj membroasocioj de EAF. Ankaŭ aliaj aktivuloj aŭ aktivemuloj estas bonvenaj informiĝi pri liberaj lokoj.

La trejnseminario estas valora ofertaĵo por niaj aktivuloj. La AKK-projekto repagos vojaĝkostojn de la partoprenantoj laŭ la tarifoj de publika transporto. Ankaŭ la programo, manĝo kaj tranokto estas senpagaj por la invititoj, sed tiuj kiuj tamen volas pagi ion estas bonvenaj donaci sumon al Junulara Fonduso. (JF estas interna fonduso de EAF por subteni esperantolernadon kaj agadon de gejunuloj. Ĝin administras kune po unu reprezentanto de EAF kaj FEJO.)

El pasintjara intervjuo

Kiel antaŭguston de la trejnseminario jen eltiraĵo de La Ondo de Esperanto (LOdE), kiu intervjuis Zikon por sia aprila numero pasintjara. Tiutempe Ziko ĵus komencis labori ĉe la Centra Oficejo


de UEA en Roterdamo. Lia ĉefa tasko estas zorgi pri la Biblioteko Hector Hodler (BHH). La biblioteko origine apartenis al Svisa Esperanto-Societo, poste pere de Hector Hodler fariĝis posedaĵo de UEA. En ĝi estas ĉ. 20 mil libroj. Krome troviĝas multaj gazetoj, fotoj, afiŝoj, manuskriptoj kaj aliaj materialoj.

Ziko mencias en la intervjuo kelkajn aliajn bibliotekojn. “Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno apartenas al la plej grandaj kolektoj, krome CDELI en Svislando, la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen kaj M.C. Butler, la biblioteko de Esperanto-Asocio de Britio.” Nun komencas la rekta eltiraĵo de la intervjuo.

LOdE: Ĉu ekzistas interbiblioteka kunlaboro en Esperantujo?

ZMS: Pri tia kunlaboro ekzistis pluraj iniciatoj en la pasinteco, ekzemple TEBA, faka asocio pri bibliotekaj aferoj, kiu bedaŭrinde iam formortis. Sed mi havas nun kontakton kun multaj Esperanto-bibliotekistoj, kaj esperas eki diskuton kun rezultoj. Plej dezirinda estas kunlaboro pri elektronika superkatalogo de ĉiuj Esperanto-eldonaĵoj.

Esperanto sen mitoj estas populara libro pri informado.



Ziko Marcus
*Sikosek venos
 al nia trejn-
 seminario.*



*LOdE: Kiel statas
 pri via propra libro,
 Esperanto sen mit-
 oĵoj? Kiajn reagojn vi
 ricevis post la unua
 eldono?*

ZMS: Mi liveris ĉion al la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, kaj supozas ke nuntempe la dua eldono estas en la presejo. La reagoj? Iom min surprizis la granda interesiĝo. Malgranda parto de la reagoj estis tre negativa, foje iom stranga: “Sikosek perfidis la internan ideon” aŭ simile. Sed la plej multaj homoj skribis aŭ: Mi tre ĝojis pri la libro, nur malsatas la iel fatalisman sintenon, aŭ: Ĝuste la ideoj kaj kritikoj, kiajn mi simile mem jam havas delonge.

Ŝajnas ke ĉiuj legantoj almenaŭ trovis ion interesan, ĉu por informado-laboro, ĉu simple por lerni pli pri la Esperanto-komunumo.

LOdE: Kiel malsamos la dua de la unua eldono?

ZMS: Lingvaj pliglatigoj, reordigoj, novaj informoj sur kelkdek novaj paĝoj, kaj ilustraĵoj.

LOdE: Kaj kion novan vi havas en la komputilo?

ZMS: Ĉu libron? Nu, mi preparas interalie libreton pri la temo “informado”, pri la praktika agado. Sed pasinte mi ne trovis la tempon por plia polurado.

(El LOdE numero 4/2003)

Postnoto: La dua eldono de Esperanto sen mitoj aperis pasintjare kaj ankaŭ vendiĝis en Finnlando. La libro pri la praktikaj flankoj de informado ankoraŭ ne estas eldonita.

Anna Ritamäki

La jubilea simbolo – arĝente!



Nun vi povas kompletigi vian veston per la jubilea simbolo de Esperanto!

Firmao *Hetta Silver* en Enontekiö produktis arĝentajn broĉojn en du grandecoj por Esperanto-Asocio de Finnlando. Sur la malantaŭa flanko de la simboloj troviĝas eta gravuraĵo EAF.

La partoprenantoj de Aŭtunaj Tagoj 2004 povis unuaj konatiĝi kun la novaĵo. Nun vi ĉiuj havas la ŝancon!

Mendu ĉe la libroservo: Esperanto-Asocio de Finnlando, Päivi Saari-
 nen, Siltasaarekatu 15 C 65,
 00530 Helsinki, aŭ retpoŝte:
 eafmendoj@esperanto.fi.

La eta pinglo kostas 12 e, la broĉo 30 e.



La tostonta prezidanto Terho Uotila donas parolon en universitata saŭno. "Espereble almenaŭ iu venos al la studrondo."

Komenciĝis la unua akademia jaro por EsperHe

La asocio EsperHe – Esperanto en Universitato de Helsinko – partoprenis la universitatan malfermokarnavalon la 10-an de septembro per propra asocia stando, kie oni ludis eo-muzikon kaj disdonis 130 broŝurojn pri Esperanto. La stando situis inter aliaj idealismaj organizoj kiel Amnesty kaj la UN-junularo. Malgraŭ la granda nombro de standoj la hazarde preterpasanta akademiestro Ilkka Niiniluoto haltis ĝuste ĉe EsperHe por iom babili kaj atesti la reaparon de Esperanto.

La sekvan tagon EsperHe ludis halpilkon en Ruskeasuo, kie la teamoj Socialistoj kaj Komunistoj ludis egale 11-11. Post sportumado oni ĵetis la unuan akademian lojlon en la kelo de la Nova studentodomo kaj aŭskultis prezidantan parolon.

La studrondo de Esperanto komenciĝis la 22-an de septembro per prelego "Mitä on esperanto?" kun la instruistino Riitta Hämäläinen kaj muzikisto Patrik Austin. Ĝin ĉeestis sep novuloj. EsperHe daŭrigas kaj dankas pro la subteno de patronoj de la universitata movado – vi scias, kiuj vi estas.

Patrik Austin

www.esperanto.fi/fejo/esperhe



fiere prezentas:

La plejpleja T-ĉemizo en la tuta mond'!

Tuj mendu, por vi kaj viaj geamikoj!

Koot: S-XXL

Värit: punainen, sininen ja musta
Rinnassa valkoisella teksti "Esperanto"

Fejolaisille käteisellä 15 euroa
ja postitse 17,50 euroa
Muille käteisellä 17 euroa
ja postitse 19,50

Paitaa myydään postitse, esperanto-tapahtumissa ja EAF:n toimistolla Helsingissä, Siltasaarenkatu 15 C 65.

Jos haluat tilata paitasi postitse, ota yhteyttä:

Katja Lampinen

040 523 6076

katja.lampinen@suomi24.fi



Muut lehdet

Elokuun puolivälissä **Kotiliesi** julkaisi kolmen sivun mittaisen henkilöjutun Patrik Austinista. Otsikko oli ”Kapinallinen kielimies”. Kuva vei yhden sivun.

Jutun alussa toimittaja kertoo esperanton syntymisen Puolassa ja Dolchamarin nykyisen menestyksen.

Patrikin osalta juttu alkaa hänen oleskelustaan koulun jälkeen Lontoossa, missä hän tutustui esperantoon tarkemmin kuultuaan siitä lapsuudessaan M.A. Nummiselta radiosta. Lontoolaisessa esperantokerhossa syntyi ajatus esperantorock-bändistä. Laulujen nykyaika ja sanoituksen tuoreus verrattuna aikaisempaan alan rockiin on musiikin suosion perusta.

”Kielissä on olennaista, että niiden avulla voi tutustua ihmisiin ja kulttuuriin. Esperanto-konferensseja järjestetään nykyisin ympäri maailmaa, vaikka liike oli pitkään voimaton”, sanoo Patrik. Hän kertoo Helsingin yliopiston esperantokerhon perustamisesta ja FEJOn toiminnasta sekä kielten oppimisen edellytyksistä omakohtaisella tasolla.

Jutussa kerrotaan vielä Patrikin toiminnasta Helsingin seudun erilaiset oppijat ry:ssä sekä hänen ajatuksistaan opettamisesta ja opettamisen keinoista koulunuorten keskuudessa. Lopussa hän kertoo Dolchamarin uudesta levystä sekä sen kappaleiden sisällöstä, niiden modernista otteesta, johon liittyy myös toivo ja yhteishenki.

Lappeenrannassa ilmestyvässä **Etelä-Saimaassa** oli 15.8. artikkeli kielten asemasta maailmassa ja kulloisenkin hallitsevan kielen maailmanvalloittamiseen vaikuttavista tekijöistä. Esperanto esitellään yrityksenä muuttaa yhden tai useamman kielen hallitsevaa asemaa.

Artikkelissa kerrotaan englannin pääsystä valta-asemaansa 2. maailmansodan jälkeen. ”Se on valtakysymys, kenen kielellä puhutaan”, sanoo dosentti Urho Määttä Tampereen yliopistosta kieli- ja käännöstieteen laitokselta.

Esperanto syntyi pyrkimyksestä kielelliseen tasa-arvoon ja luoda siitä maailman tärkein kansainvälinen kieli. Päämäärää ei ole tavoitettu, mutta kielen tuntee noin miljoona ihmistä maailmassa.

Englannin kielen professori Terttu Nevalainen Helsingin yliopistosta myöntää, että esperanton idea on demokraattinen ja Urho Määttä arvioi, että esperantolla ei ole kulttuuria takanaan, kun kieli ei ole vain mekaaninen väline. ”Yhteisö pitää huolen kielestä”, hän sanoo.

Prof. Jouko Lindstedt puolestaan toteaa, että esperantolla on oma kulttuurinsa. ”Kaunokirjallisuus kehitti esperanton kulttuuria. Se kehittyy harrastaja- ja perhetapaamisien sekä internetin ansiosta.”

Esperantisteja on paljon mm. Brasiliassa, Iranissa, Madagaskarilla, Kuubassa, Japanissa ja Kiinassa.

Jutussa kerrotaan, mitä eri kielten piirteitä ja rakenteita Esperantossa on käytetty.

Suomen Esperantoliiton syyspäivät Iisalmissa, Runnilla, sai tilaa 19.9. maakunnan lehdessä, **Iisalmen Sanomissa**.

Syyspäivistä kertovassa jutussa haastateltiin Anna Ritamäkeä ja Tiina Oittista. He kertoivat esperanton käytöstä ja harrastamisesta nykyään, sen synnystä ja rakenteesta. Iisalmen Esperanton harrastuksesta kertoi iisalmelainen Reino Eriksson.

Iisalmella opetettiin koulun kerhossa esperantoa ensimmäisen kerran 1906. Viimeksi opetus oli erittäin aktiivista 1970-luvulla. Iisalmen Esperanto-kerhoa kohta 20 vuotta puheenjohtajana vetänyt Onni Kauppinen sanoi, että hän on tavannut esperantisteja 40 eri maassa.

Tiina Oittinen ja Anna Ritamäki arvioivat, että esperanton suosio on lisääntynyt viime aikoina. Henkilökohtaisten tapaamisten lisäksi kieltä käytetään internetissä omilla keskustelupalstoilla. Helsingin yliopistoon on perustettu ▷

Okazis en Metsäkylä

La 11an de septembro 2004 la polaj ambasadoro, kulturataŝeo kaj konsulo vizitis Aini Vääräniemi en Metsäkylä, Taivalkoski, pro la 60a datreveno de la konstruado de milittempa fervojo fare de rusaj militkaptitoj kaj polaj civilaj kaptitoj. La 171-kilometra fervojo, jam mal-konstruita, estas nomata la Fervojo de Morto pro la longa suferado kaj mortado de la konstruantoj, kies kaptitejo situis tute proksime al la hejmo



de Aini. Kiel sciante, la filmo Reveno al Finnlando estis farita kunlabore de poloj kaj finnoj en 1991, helpe de Esperanto. Aini en sia regiono daŭre provas

El maldekstro konsulo Andrzej Jasionowski, ambasadoro Stanislav Stebelski kaj Aini Vääräniemi.

antaŭenigi Esperanton per kursoj kaj eventoj. Unu el ŝiaj ideoj estas kontaktiĝi kun pola vilaĝo, kie estas farataj argilaĵoj. La argila temo povus plifirmigi la rilatojn, ĉar ankaŭ ŝiaj samvilaĝanoj prilaboras lokan argilon.

Saliko (kiu vizitis Ainin 4.-5.9.)

Esperanto-societo en Turku – Turun Esperanto-yhdistys

Kongreslanda kunveno, la renkontiĝo kiam ni rememoras la UK:n kaj aliajn ĉi-somerajn eventojn okazos dimanĉe 24-an de oktobro 2004 je 14a en la Blua Salono de la Malnova Urbo-domo, adreso Vanha Suurtori 5. Veikko Tikkanen montros diapozitivojn pri sia kongresa vojaĝo al Ĉinio. Mikko Mäkitalo rakontos pri sia vojaĝo al IJK en Rusio. Ankaŭ aliaj someraj kaj aŭtunaj eventoj estos pritraktitaj. Bonvenon ankaŭ gastoj! Kafumado 2,50 eŭrojn.

Kesäisiä ja syksyisiä esperantomailman tapahtumia muisteleva tapaaminen järjestetään Vanhan Raatihuoneen Sinisessä salissa sunnuntaina 24.10.2004 klo 14.00. Myös vieraat tervetulleita!

EST estraro

▷ myös uudelleen esperantojärjestö.

4.9. Iisalmen Sanomissa haastateltiin esperantisti Giorgio Silferiä, joka on kansainvälisen kirjailijoiden PEN-klubin jäsen. Hän edustaa PEN-klubissa esperantoksi kirjoittavia kirjailijoita. Heitä on kaikkiaan 23 henkilöä. Giorgio Silfer poikkesi Iisalmelle syyskuun alkupäivinä matkallaan Tromssaan Kansainvälisen PEN-klubin maailmankongressiin. Toinen paikalla ollut esperantisti oli Heroldo-lehden päätoimittaja Perla Martinelli.

Giorgio Silfer tunsu Iisalmen henkilökohtaisesti, sillä hän asui kaupungissa kolme vuotta 1970-luvulla ja opetti silloin esperantoa kansalaisopistossa. Giorgio on italialainen kielitieteilijä ja on nyt italialaisen Lombardon alueelli-

sen parlamentin asiantuntijatehtävissä. Hän arveli, että Iisalmella olisi ollut tilaisuus 1970-luvulla tulla esperantistien keskuspaikaksi, jos silloista innostusta kieleen olisi huomattu hyödyn-tää. Iisalmen kulttuurikeskusta hän piti sopivana kokoontumispaikkana esperantistien kansainväliselle tapaamisille tai PEN-klubin kokouksille.

Perla Martinelli kertoi, että valmisteilla on esperantonkielisen naistenlehden perustaminen.

Martinelli ja Silfer tapasivat myös slovakialaiset esperantistit, jotka olivat vierailulla Iisalmen esperantokerhon puheenjohtaja Onni Kauppinen luona.

Jukka Noponen

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ◆ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ Taneli Huuskonen, huuskone@cc.helsinki.fi www.esperanto.fi/helsinki
- ◆ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohjantie 298, 74100 Iisalmi.
- ◆ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ◆ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ✉ martti.pennanen@phnet.fi
- ◆ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu.
- ◆ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla. ✉ matti.wallius@ebaana.net
- ◆ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, ✉ lauri.liukkonen@jippii.fi)
- ◆ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ◆ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ✉ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ◆ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606
- ◆ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2004 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Tavassalossa.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2004**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Ilmoitukset joko sähköpostitse: eaflehti@esperanto.fi tai suoraan liiton toimistoon: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

dupluströ



Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 15.11.2004 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2004 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafllehti@esperanto.fi>.